

Europaj tradicioj kaj la verkaro de A. Sumarokov Analizo de la komedio "Kverelo de edzo kun edzino".

Ludmila MURSALIJEVA (RU)

En la 50-aj jaroj de la XVIII-a jarcento en Rusio formiĝas rusa literatura dramo. Tre grandan rolon en tiu procezo ludis Aleksandr Sumarokov (1717-777). Li estis talenta dramverkisto, tradukisto, poeto kaj kritikisto, la unua rusa profesia verkisto.

Lia agado komenciĝas en la periodo, kiam formiĝas la rusa nacia literaturo kaj teatro. En la 30-aj/50-aj jaroj de la XVIII-a jarcento en Rusio maturiĝis la kondiĉoj por krei monduman kulturon de la eŭropa tipo. Post la reformoj de Petro la Granda (1672-1725) la rusa kulturo akiras definitive monduman karakteron. La mezepoka religia ideologio en la kompreno de homa naturo, kiu regis antaŭ Petro la Granda, foriras nun en la pasintecon. Nun oni serĉas novajn kriteriojn por pritaksi moralan dignon de homo. La ĉefa principo estas servado al interesoj de la ŝtato. La caro, same kiel simpla civitano, devas pensi unuavice pri interesoj de la ŝtato. Petro la Granda estis por multaj homoj ekzemplo de tiu civitano kaj monarko, ĉar per siaj reformoj li komencis formadi la novan kulturalan aspekton de Rusio. Pro tio en la XVIII-a jarcento en Rusio la ideo de klera monarkio estis tre populara. Klasikisme estis estetika doktrino, konvena je nivelo kaj bezonoj de soci-politika vivo en Rusio en tiu epoko. La klasikismo disfloris en Francio en la XVII-a jarcento kaj disvastiĝis tra la tuta eŭropa kulturo. La franca kulturo, kaj aparte la atingoj de klasikisma teatro, forte influis la evoluon de rusa monduma kulturo, helpis ĝian evoluon en la direkton de klasikismo.

La verko de Sumarokov "Du Epistoloj" - en la unua temas pri la rusa lingvo, en la dua pri poeziverkado (1) - iĝis siaspeca manifesto de rusa klasikismo. Ĝi aperis en 1747. Por difini ĉefajn taskojn de rusa literaturo, li baziĝas sur la verko de Boileau "La poezia arto"

("L'Art Poétique"). Sumarokov strebis plialtigi la nivelon de rusa literaturo, doni al ĝi honoran lokon inter aliaj eŭropaj literaturoj. Li opiniis, ke literaturo estas grava rimedo por plibonigi la morojn, ĝi estas lernejo, kiu edukas virtojn, altajn moralajn principojn, patriotismojn.

Sumarokov asimilis kaj kree uzis eŭropajn tradiciojn. Li verkas tragediojn uzante materialojn de rusa historio, kio estas tute natura sur la fono de "ĝenerala kresko de nacia sinkonscio, strebo de agantoj de rusa kulturo de la XVIII-a jarcento konfirmi la signifon de sia historia pasinteco, siajn historiajn tradiciojn, kiel devas esti en la ŝtato, kiu eniris la familion de eŭropaj nacioj". (2)

Sumarokov estis unu el plej klerigitaj homoj de sia epoko. Li bone konis antikvan kulturon kaj plej gravajn atingojn de eŭropa kulturo, aparte franca. "Por Sumarokov Racine estis modelo en tragedia ĝenro, Moliere - modelo en komedio, Boileau estis ĉefa teoriisto de dramverkaro, Voltaire - supera aŭtoritato, supera juĝisto en ĉiuj problemoj de teatro de tiu epoko". (3)

La literatura agado de Sumarokov komenciĝas en 1740-aj jaroj. En tiu tempo en Rusio ekzistis nek nacia teatro, nek nacia dramverkaro. Estis popularaj gast-roloj de eksterlandaj aktoroj - francaj, italaj, germanaj, kaj same la spektakloj de kortega kaj lerneja teatroj, kiuj havis plejparte religian karakteron.

La verkaro de Sumarokov estas ege varia: amkantoj, elegioj, idilioj, satiroj, fabloj. Sed li estas konata antaŭ ĉio kiel dramverkisto. Konforme al estetiko de klasikismo, li kreis 9 tragediojn en versoj, 12 komediojn en prozo, el kiuj 8 estas unuaktaj teatraĵoj kaj kvar estas triaktaj. Liaj komedioj ne estis konformaj al la formo de alta klasikisma komedio (ĝi devis havi kvin aktojn kaj versan formon). La kialo estas simpla: en Rusio en tiu epoko la komedio estis "malgranda teatraĵo" kaj estis prezentata kutime post la tragedio. (4) Tamen de la ideo vidpunkto liaj komedioj estis plene konformaj al la klasikisma estetiko: ilia celo estis "pere de primoko plibonigi la morojn". (5) En la "Epistolo II" Sumarokov proponas tutan programon de sia

komediverkado, li montras sociajn malvirtojn, kiujn necesas primoki unuavice:

“Montru senkoran ekleziulon,

Juĝiston, kiu ne komprenas la leĝon.

Montru al mi dandon, kiu tre fieras

Pro tio, ke ĉiam pensas pri beleco de siaj haroj,

Kiu opinias, ke li naskiĝis por amoro,

Por frenezigi iun similan stultulinon.” (6)

Liaj komedioj de la 50-aj jaroj (“Tresotinius”, “Monstroj”, “Kverelo de edzo kun edzino”) ne havas intrigon. “La fabula bazo de tiuj komedioj estas ege simpla: la patro volas edzinigi sian filinon, por kiu kelkaj fianĉoj konkuras. Kutime la elekto de gepatroj kaj de filino ne koincidas, kaj ĉiuj agoj servas por diskrediti fianĉojn kaj detru la gepatrajn planojn”. (8) Tiu skemo estas tradicia en la itala komedio dell’arte, kaj ni povas vidi ĝian influon je la verkaro de Sumarokov. Serĉante nomojn por siaj protagonistoj, Sumarokov same orientiĝas je eŭropa tradicio, kvankam li komprenas ĝin kreece. Kune kun kutimaj en franca kaj itala komedio nomoj - Oront, Fineta, Klarisa, Arlekin kaj aliaj, li uzas nomojn, stiligitajn kvazaŭ eksterlandaj, aŭ ankaŭ rusajn nomojn: Delamida, Salmina, Djulij, Kimar (Kimar - estas formita de rusa vorto *kimaritj* - nenion fari, esti mallaborema). (7) La nomoj de kelkaj negativaj personoj estas elpensitaj de Sumarokov, ekz. Tresotinius, Bobembius (Tresotinius el franca *Trissotin* -tristultulo, el *sot* - stulta, stultulo).

Ĉiuj tiuj karakteraj trajtoj aperis jam en lia unua unuakta komedio “Kverelo de edzo kun edzino”(1750). Evoluigante eŭropajn teatrajn tradiciojn, li respogulas en tiu komedio aktualajn problemojn de rusa vivo. Komence Sumarokov sekvas, verŝajne, la tradicion de Plaŭto: li resumas la enhavon de la komedio. La servistino Fineta rakontas: “Hodiaŭ estos kverelo en nia domo, la patro elektis fianĉon por la filino, la patrino elektis por ŝi alian fianĉon, kaj la filino mem eĉ tute ne pensas pri geedziĝo, ŝi pensas nur pri belaj vestaĵoj kiujn neniu havas, kaj volas, ke ĉiuj dandoj admiru ŝiajn vestaĵojn, kaj normalaj

homoj eĉ ne proksimiĝu de ŝi”. (9)

Do, en la centro de tiu verko estas elekto de fianĉo por dandino kaj koketulino Delamida kaj kaŭzita de tio kverelo de ŝiaj gepatroj. Sumarokov montras al ni du admirantojn de Delamida, ambaŭ estas negativaj personoj. Fatjuz estas ĝeneraligita tipo de provinca nobelulo - malklerulo kaj konservativulo. Nenio lin tuŝas, li sin svatas al Delamida ne pro kora pasio, sed pro gepatra volo. Fatjuz vivas laŭ malnova modo, li estas malamiko de ĉiuj eŭropaj novaĵoj, kiuj eniras rusan ĉiutagan vivon: bilardo, ĉampano, laŭmodaj vestaĵoj. Li mem ne estas tro klerigita: li eĉ legas kun peno, ne kapablas diferencigi germanan kaj francan lingvojn. Tiu persono estas grava atingo de Sumarokov. “Fatjuz iĝis la unua komika prezentado de rusa provinca nobelulo”. (10) Li komencas longan galerion de similaj tipoj, mallaboremaj kaj malklerigitaj rusaj provincaj nobeluloj, kiuj iĝis tre popularaj en komedioj de sekvaj dramverkistoj (D. Fonvizin kaj aliaj).

Djulij estas lia malo, li estas ĝeneraligita tipo de monduma dando. Li malestimas ĉion rusan, pensas nur pri vestaĵoj kaj amuzoj. En lia parolado abundas francaj vortoj kaj esprimoj. Li opinias sin 'galantom' (el franca *galant homme*), lia ĉefa celo - kopii francan aristokrataron, vesti sin laŭmode, fari komplimentojn al virinoj, “Pri virinaj festvestoj paroli” (sceno17).

Virina varianto de dandino, kiu blinde sekvas ĉion francan, estas Delamida kaj same ŝia amikino Djufiza. Ili ambaŭ multe similas je Djulij, same parolas iun miksitan francrusan lingvon. Sed ĉiu el ili havas iujn novajn trajtojn, kiu kompletigas la tipon de rusa dando de la XVIII-a jarcento. Ekz. Delamida ne estas indiferenta al Djulij, sed ŝi tute ne intencas geedziĝi kun li. Ŝi tiamaniere klarigas sian rifuzon: “Se vi iĝus mia edzo, eĉ se vi multajn *kalite* havus, mi ne plu povus vin *estimirovatj*”. Ŝi daurigas: “Ami sian edzon! ha! ha! ha! Tio decas al iu provinca baba!” (sceno18). Kaj Djufiza ekmalsanis pro tio, ke iu “diris publike, ke Klarisa vestas sin pli bele, ol mi” (sceno 19). Djufiza ne nur admiras francan modon, sed ŝi mem pretendas esti

leĝdonantino pri la modoj. Ŝi eĉ ellaboris tutan programon: “Unue: mi volas enkonduki la modon, ke la damoj, same kiel viroj, portu monujn; due: ke oni portu orelingon nur sub unu orelo, sed ne sub ambaŭ. Trie: nur unu vango estu ruĝkolorigita, sed ne ambaŭ. Kvare: ke oni ne diru “sudarj” kaj “sudarynja”, sed diru “monsieur” kaj “madame” (sceno 21).

La patrino de Delamida, sinjorino Salmina, ege similas ilin. Ŝi revas edzinigi sian filinon kun Djulij. Hejme ŝi estas ĉefo de familio, ŝi ege alte taksas sin mem, la edzo timas ŝin kaj obeas. Se ŝi ne pretendas esti dandino, do nur pro sia aĝo. La patro de Delamida, Oront, estas timema, senvola, limigita provinca nobelo, kiu vivas sub premo de sia edzino. Oront volus edzinigi sian filinon kun Fatjuij, kiu ege similas lin. “La persono de Oront estas ege interesa pro tio, ke en estonto similaj senvolaj kaj senpersonecaj homoj aperos ofte en la rusa komedio kaj kronos ilian galerion Prostakov en la komedio de Fonvizin”. (11)

Meritas atenton ankaŭ du servistoj en la komedio: Fineta kaj Kimar. En tiuj personoj ni sentas la influon de eŭropa tradicio de Plaŭto kaj Moliero, kaj same la influo de rusaj popolaj spektakloj pri grandsinjoro (*barin*). (12) La servistoj estas ruzaj, elturniĝemaj, prudentaj, ege fidelaj al siaj mastroj: Fineta - al Delamida, Kimar - al Oront. Tiuj personoj estas samtempe plej teatraj, konvencijaj, farsaj. Ekzemple, en la sepa sceno, kiam kolerigita Salmina postkuras sian edzon por bati lin, ŝi falas, kaj Kimar kondukas sin ege aroge kun ŝi: li insultas ŝin pro tio, ke ŝi ne respektas ŝian edzon. Kiam ŝi petas helpon por ekstari, li respondas: “Ne, kara sinjorino, vi estas tro peza! Estu ĉarma, restu sidi. Mi konas unu mekanikiston. Tio estas lia afero, levi pezaĵojn.” En tiu momento aperas Djulij, sed li same ne povas helpi la sinjorinon, ĉar por tio li bezonas ... gantojn! Ĉar “estus malrespekto, se mi vian manon per la nuda mano prenos” (sceno 8).

La solvo de la komedio ne estas tradicia. Delamida rifuzas sian manon al ambaŭ pretendantoj. Salmina, ŝia patrino, malkontenta de tiu solvo, promesas venĝi sian ofendon sur sia edzo.

Ni opinias, ke tre probable, Sumarokov verkis sian komedion sub influo de la unuakta komedio de Moliero “Aristokrataj burĝinoj”, kiu estas verkita same en prozo kaj havas similan temon. Moliero en sia komedio (“La Ridindaj Preciozulinoj”)¹ primokas preciozan aristokrataron, kiu strebis krei sian propran kulturon kaj lingvon, kompreneblan nur por elektita rondo. En lia komedio temas same pri geedziĝo, same forestas la tradicia solvo: geedziĝo de geamantoj. La ĉefa celo de tiu komedio - montri kaj primoki absurdaĵojn kaj ekstremajojn de precioza kulturo kaj ĝian malutilan influon je junaj homoj.

Sumarokov tre alte taksis la talenton de Moliero kaj, sendube, lernis komedian arton laŭ liaj komedioj; li strebis adopti liajn plej bonajn tradiciojn. “Aristokrataj burĝinoj” estas la unua verko de franca komediverkisto, kiu donis al li sukceson kaj ĝeneralan rekonon. Eblas, ke Sumarokov, kiu strebis krei verkojn de rusa literaturo, dignaj de eŭropa rekono, atentis ĝuste tiun komedion kaj verkis ĝian rusan varianton.

Notoj

1. Epistolo (lat. epistola - letero) - literatura verko, kutime versa, en la formo de letero, en kiu la aŭtoro esprimas siajn ideojn pri iu problemo. Kiel literatura ĝenro epistola ekzistis en Rusio en la XVIII-a jarcento. (Rig.: Kvjatkovskij A., “Poezia vortaro”, Moskvo, 1966, p. 357).
2. Stennik Ju., “Sumarokov”, en “Historio de rusa literaturo en kvar volumoj”, red. Pruckov N., v. 1, Moskvo, 1980, p. 551.
3. Kulikova K., “De rusa teatro unuaj aktoroj”, Leningrado, 1991, p. 74.
4. “Historio de tutmonda literaturo”, red. Berdnikov G., vol. 5, Moskvo, p. 375.
5. Sumarokov A., “Epistolo II”, en libro: Sumarokov A., “Elektitaj verkoj”, Leningrado, 1957, p. 121.

¹ 'Les Précieuses Ridicules' tradukita en E-on far de André Ribot, editis E. F. E.

6. Same, p. 121.
7. Berkov P., "Historio de rusa komedio de la XVIII-a jarcento", Leningrado, 1977, p. 34.
8. Stennik Ju., "Sumarokov", en "Historio de rusa literaturo en kvar volumoj", red. Pruckov N., v. 1, Moskvo, 1980, p. 554.
9. Ĉi tie kaj plue mi citas la komedion de Sumarokov "Kverelo de edzo kun edzino" laŭ la libro: "Rusa komedio de la XVIII-a jarcento", Moskvo-Leningrado, 1950.
10. Berkov P., "Historio de rusa komedio de la XVIII jarcento", Leningrado, 1977, p. 36.
11. Same, p. 37.
12. Same, p. 34.

Adreso de la autorino:

Ludmila MURSALIJEVA

Doktoro pri Filologiaj Sciencoj

Docentino de Baŝkiria Ŝtata Universitato

UFA - BAŜKIRIO

RUSIO

Hejma adreso:

RU 450044 UFA - 44

ul. Komarova, d. 26, kv. 21

Tel.: 007-3472-42-03-42.

Problemo de "Innerlichkeit" en germana literaturo de la XX-a jarcento. (Verkaro de Wilhelm Raabe).

Tatjana AVAGJAN (RU)

"Innerlichkeit" en germana lingvo signifas "enprofundiĝo en si mem". Ĝi estas grava specifa trajto de mondkoncepto kaj mondpercepto de germana burĝaro.

Pro historiaj kondiĉoj la germana burĝaro estis konservativa kaj strebis eviti ĉian politikan agadon. Tio forte influis la tradiciojn de germana burĝa spirita kulturo. Germana burĝaro strebis deflankiĝi de la socia vivo, foriri en la mondon de intensa spirita aktiveco, konservi sian spiritan sendependecon. De tio naskiĝis la fenomeno de germana kulturo kaj literaturo, nomata "Innerlichkeit".

La nocio mem de "Innerlichkeit" estas ne nur literaturscienca termino, sed ankaŭ socia kategorio. Thomas Mann donas tre profundan difinon de tiu nocio en sia artikolo "Germanio kaj germanoj" (1945). Li vidas ĝin en la disdubiĝo de homa energio je du elementoj: abstrakt-spekulativa kaj soci-politika, kaj la unua elemento subpremas la duan. (1) Li asertas, ke "Innerlichkeit" estas ne nur etika kaj estetika principo, sed ĝi estas parto de mondkoncepto kaj mondpercepto de germana burĝaro. Ni devas serĉi la fontojn de "Innerlichkeit" ne nur en la literaturo, sed ankaŭ en la historio kaj filozofio.

Tiuj fontoj troviĝas en la historio de la germana ŝtato. En la XVI-a jarcento la germana burĝaro kun subteno de kamparanoj kaj kavaliroj faras sian revolucion, kiu nomiĝas Reformado. F. Engels substrekas "siaspecan teologi-teorian karakteron de germana revolucio", "intereson por la fenomenoj, kiuj estas de alia mondo", kiel rimedo de distanciĝo de la mizera realo", (2) - kio iĝis unu el premisoj de "Innerlichkeit".

En la germana filozofia penso tiuj premisoj estas pli evidentaj. Ni trovas ilin en la serĉoj de silezia ŝuisto J. Böhme (1575-1624). F. Engels skribis, ke Böhme estis "malklera, sed profunda animo",